☆ Dankon pro la invito en vian Panteonon, Katalin! ☆

**Esperanto-edukado en la familio** **1**
📢 Mia stilo por disvastigi Esperanton 2
✍️ Miaj konvinkoj en lingvoinstruado 2
**Miaj agadkampoj** **2**
🧑‍🏫Instruado 2
👩‍🎓Lingvistika projekto 4
🔬🧠 Scienco 4
📚 Literaturo 4
🎻🤡Arto kaj spektaklo 4
🚘🚗🚍🚈 Turismo, turneoj 5
🎪 Kulturaj eventoj 5
🗞️🎤📺📷 Amaskomunikiloj 6
⚒️🛜Teĥnologio 6
🌍Sociaj retoj 7
🌐 🤝Internacia kunlaborado 7
Supozeble mi forgesis mencii kelkajn originalajn agojn, kaj mi enmetis bagatelajn banalaĵojn en la liston… 8
Projektoj, revoj 8
Fakte ne, mi havas nur unu revon: 8
**Paco venu! For la militoj!** **8**

Mi estas Fransoazo, instruistino en Francujo. Françoise NOIREAU, naskiĝinta en Parizo la 11/11/1963.

👩‍🏫Profesie, mi estis instruistino, poste psikopedagogo, psikoterapiistino kaj duonprofesie violonistino. Kiel esperantistino, mi fariĝis dumviva membro de UEA kaj mondcivitano (karto skribita en Esperanto) antaŭ 30 jaroj. Mi nun havas 60 jarojn.

🔍 Jam de la infanaĝo mi aŭdis pri Esperanto en mia biciklema Pariza familio. Sed dum miaj lernojaroj mi vane serĉadis kiel eklerni ĝin, ĉar neniu instruisto kuraĝigis min, male!.

🔑 En januaro 1990, mi estis 26-jaraĝa instruistino en bazlernejo, kaj mi fine trovis Esperanton en sindikata revuo por instruistoj. Mi lernis ĝin per Assimil-libro po 7 lecionojn tage, kaj post unu jaro mi jam instruis ĝin en kulturdomo.

# Esperanto-edukado en la familio

💚 En 1992, post la naskiĝo de mia 3-a bebo, mi decidis ne plu paroli france antaŭ miaj familianoj. La unuajn monatojn, mi diris duoblajn frazojn al mia edzo kaj filo.
Edukado per Esperanto, denaskismo, 1 persono 1 lingvo, tiuj estis kaj estas miaj ŝatataj temoj. Nun mi sekvas la lingvan evoluon de mia denaska sed fora nepo (Kanado).

👩‍👧 Miaj 3 gefiloj do estas denaskuloj. Mia plej eksterordinara atingo, la fieraĵo de mi vivo estas la esperantigo de mia edzo kaj 3 gefiloj, sen instruado, per natura maniero, danke al niaj multaj gastoj.

🙋‍♂️Ĵeremi BERT, kunorganizis FESTO-n, estis regiona kandidato por EDE (Esperanto Demokratio Esperanto) por eŭropaj balotoj, volontulo por TEJO en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo dum jaro kaj ½, dumviva membro de UEA, nun vivas en Nederlando. Li havas internacian familion.

🙋Marĵolen BERT, prelegis en Parizo ĉe UNESKO kaj finis sian paroladon en Eo, menciis Esperanton en pluraj intervjuoj, artikoloj kaj filmetoj, instruis E-on en Lingva Festivalo, prelegis en la UK en Torino pri la

NRO kiun ŝi kreis kaj estras, pri daŭripovaj teĥnikoj kun rifuĝintoj. En Vjetnamujo, ŝi oficiale dungis asistantinon esperantistino en la NRO kie ŝi laboris. Ĉiujare ŝi instruas daŭripovajn simplajn teĥnikojn en pluraj famaj altlernejoj por inĝenieroj kaj prezentante sian homhelpan organizaĵon, ŝi klarigas ties Esperantan nomon.

🙋Letisja BERT, mia plej juna filino, doktoriĝas en Kebekio, ŝi iam estis kasisto de JEFO, reprezentanto de TEJO en UN-o en NovJorko, aŭtoro de publikigitaj sociologiaj artikoloj en Esperanto, patrino de Tomĉjo, denaskulo. Laŭ mia scio, ŝi estas la sola denaskulo, kiu lernis la lokan lingvon nur post flua parolado de Esperanto. Mi memoras, kiam la instruistino triumfe informis min “Ŝi respondis al mi en la franca! La unuan frazon en la franca!”

## 📢 Mia stilo por disvastigi Esperanton

Mi disvastigis Esperanton per mia familia uzo kaj vivmaniero. Sen flagoj, sen propagando.
Mi ofte invitis esperantistojn al miaj lernejoj, por ke ili montru ion al unu aŭ kelkaj klasoj.
Mi neniam instruis Esperanton al miaj infanoj, mi nur persiste respondis Esperante kaj eble plej gastigis.
Mi fidas la naturan metodon.
Miaj vojaĝoj, miaj muzikoj kaj spektakloj rilatis kun Esperanta agado. Mi simple montras Esperanton.

## ✍️ Miaj konvinkoj en lingvoinstruado

Ekde septembro 1990, mi instruis per la Cseh-metodo al plenkreskuloj en la kulturdomo de mia urbo.
Mia pedagogio al plenkreskuloj ĉiam baziĝis sur konkreta celo (utila projekto) kaj ripeta, dialoga kaj rolluda aktiva partopreno (Cseh, rekta metodo). Mi profesie instruadis, do mi baziĝis sur rekta metodo, socikomunika metodo, dialogoj, ludoj, rolludoj, projektoj (konkurso aŭ konkreta realigo). Tio efikas en Francujo. Ankaŭ en Litovujo. Mi ŝatas la BEKKURSO-n, de Dennis Keefe ĉar ĝi estas abunda, trejna kaj tre kompleta por ĉiuj niveloj. Mi uzis ĝin por adoleskantoj kaj plenkreskuloj en Ĉuvaŝujo, Rusujo.
En Tajlando, Azio, mi insistis pri la elparolo kaj mi batalis kontraŭ la hontemo paroli kaj ludi.
Por instrui en Kongo, Afriko kaj krome per-distance, mi uzas ian programitan metodon (metodoj de la 70-aj jaroj) sed per Vatsapo (WhatsApp) kaj franclingvan (tio estis postulo de Elisée Byelongo, la rektoro de la konga universitato, kaj li pravis.)

# Miaj agadkampoj

## 🧑‍🏫Instruado

### 1. Lernejoj kaj universitatoj: Enmeti Esperanton en la oficialajn instruprogramojn, kaj instrui en tiuj kursoj.

- ★ En mia klaso de 11 kaj 12 jaruloj, en 1997 en Briancono (Briançon), sudaj Alpoj, ne instruado sed leter-korespondado kun 22 klasoj en 22 landoj kaj kreado de komputila programo por tion prezenti, tio impresis la inspektoron ;
- ★ En infanludejo, sudokcidente de Francujo, per natura metodo, sportaj ludoj, kanto-konkurso kaj presado de bildstrio. Oficiala instruado sed ekster la Nacia Edukado ;
- ★ En universitato en Sud-Kivuo (Kongo), lanĉo de distanca Esperanto-kurso en kreata fakultato pri lingvoj, Esperanto kaj interlingvistiko. La 3-an jaron jam registriĝis pli ol 110 gestudentoj por sekvi mian individuan kurson per Vatsapo (WhatsApp) kaj jam 3 aliaj instruistoj kunlaboras kun mi.

## 2. En Esperantujo: Partopreni, kiel instruisto, al internacia programo de amas-instruado.

- ★ Ekparolu! Per Skype, individua paroliga projekto de Edukado.net. ;
- ★ Kursaro de la Nord-Londona Klubo: per Zoom, kolektiva paroliga tutmonda instruado.

## 3. Perretaj kursoj: Krei kaj kreskigi retan lerno-platformon por ebligi al larĝa franclingva publiko en Afriko aliri Esperanto-kursojn flekseble.

- ★ Paralele al mia universitata kurso, mi kreskigas pli larĝan komunumon de konganoj, kiuj neformale lernas per WhatsApp.Per tiu senpaga amasinstruado, mi kunhavigas lernomaterialojn (gramatikajn bildojn, tutajn kursojn en pdf-formato, konsilojn, kvizojn ktp) utilajn ankaŭ por afrikaj instruistoj ;
- ★ En 2023, en mia afrika ekster-universitata neformala kurso, kaj sendiploma, jam estas pli ol 230 kursanoj en 3 grandaj  Vatsap-grupoj.
- ★ En 2023, komenco de instruado per Fejsbuko (Facebook) en privata grupo de membroj de Mensa-France (NRO, organizaĵo de homoj kun alta intelekto).

## 4. Asocioj kaj kluboj: Krei lokajn senpagajn Esperanto-klubojn por allogi proksiman diversan publikon.

- ★ En 4 regionoj de Francujo  mi lanĉis kaj gvidis ĉiusemajnajn Esperanto-kursojn, en diversaj kondiĉoj: Mi kreis kursojn kaj administris klubojn en urbetoj (Briançon, Toulon, Montauban, Querrien), kie mi loĝis.
- ★ Ankaŭ neformalan sed regulan poliglotan kunvenon, en kafejo malfermata al ekstera publiko, en Finistero (tute okcidenta parto de Francujo, kie homoj defendas la lokan bretonan.).

## 5. Instruado al instruistoj: Organizi kaj mastrumi grupojn por konsili al aliaj instruistoj, kolekti kaj diskonigi instrumaterialon.

Miaj gefiloj kutimas kritiki min: :La mondo ne estas klasĉambro!” Estas vere, ke mi ne povas min deteni de instrui, konsili, korekti. En ĉiuj okazoj, detaloj saltas al miaj oreloj aŭ okuloj. Neeviteble.

- ★ Mi kreis plurajn grupojn danke al diversaj sociaj retoj, kiujn mi administras au administris, kaj kie mi alŝutas dokumentojn (en Signal, Facebook, WhatsApp, Viber, Telegram, Line, Mia Vivo, VKontakte kaj eble aliaj.)
- ★ Lastajn jarojn, mi foje prezentas mian prelegon “Oftaj lingvaj eraroj” perrete laŭ invitoj de eksterlandaj kluboj.

## 6. Internacia lerneja aŭ kluba korespondado: Instigi internacian komunikiĝon kaj naturan amikiĝon trans la landlimoj.

- ★ Ĉiun fojon, kiam mi lanĉas tiaspecan projekton,  mi denove realigas mian infanan revon pri translima komunikiĝo. Abundajn internaciajn kontaktojn mi nepre ĉiam trovis por miaj publikaj kursoj (ekster Esperantujo).
- ★ Kaj komunikiĝi per la kamerao de mia telefono kaj Skajpo aŭ Vatsapo, mi faris jam antaŭ multaj jaroj por miaj grupoj. Ekz.ni praktikis paperfaldadon (origamion) kun japanaj infanoj antaŭ almenaŭ 10 jaroj.

## 👩‍🎓Lingvistika projekto

➢ Partopreni al esploro ligita al Esperanto por plifortigi ties universitatan valoron.

En 2022, Viko, profesoro en Sevilo, kun sia organizaĵo Civiencia, lanĉis lingvistikan esploron ĉefe ĉe miaj studentoj en UEC, *Université Espoir du Congo*, kie mi distance instruas Esperanton al pli ol 110 gestudentoj. *Roloj kaj influoj inter lingvoj dum la lingva lernado en Afriko.*

Kaj en 2023, li prezentis nian filmeton al konkurso de hispanaj universitatoj pri Afriko kaj defendo de la lokaj lingvoj. La projekto kreskas.

## 🔬🧠 Scienco

➢ Diskonigi sciencan fakon kaj vulgarigi freŝan eltrovon en scienca kampo.

Kiel faka instruististino kaj poste psikoterapiistino por infanoj kiuj montras kondutajn defiojn aŭ perturbojn, neŭropsikologio apartenas al mia kampo. Mi mem, diagnozita en la aĝo de 55 jaroj kun aŭtismo kaj alta intelekto, spertas aŭtismon de la interno. Post distancaj studoj pri neŭrofiziologio de aŭtismo, per MOOC, ĉe Universitato de Ĝenevo, mi ricevis diplomon pri tiu fako.
Por Retoso, mi realigis la filmeton "Aŭtismo hodiaŭ", en kiu mi prezentas freŝajn sciojn pri aŭtismo. https://youtu.be/bAnB7fE6p9Y?feature=shared

## 📚 Literaturo

➢ Kuraĝigi la produktadon kaj tradukadon de literaturaj verkoj en Esperanto.

➢ Antaŭenigi la legadon kaj aprezon de la esperantlingva literaturo.

★ Vortarojn mi frandas kiel ĉokoladon. Do, mi legis plurajn francajn vortarojn, sed laŭ la hazardoj, de vojaĝoj kaj petoj, mi provlegis ankaŭ bosnian, limoĝan (dialekto de la regiono Limousin)  kaj tajan provojn de vortaroj ;
★ Mi ankaŭ korektis kaj komentis la lastan eldonon de la lernolibro de Esperanto-France "Metodo 11" ;
★ Mi recenzis kroatan libron pri cerbo-perturbo (balbutado), "Mi resanigis PPPetron" ;
★ Mi tradukis libron pri didaktiko de lingvoj, sed la komputilan diskedon perdiĝis survoje al Pápa.
★ Por la revuo de ILEI mi raportis pri mia naturmetoda instruado en kolektiva formala infanejo ;
★ Mi verkis poemon laŭ mendo de muzikisto, kiu registris la faritan kanton en Danujo.
★ Pri infana literaturo, mi korektis tradukon de la kroata al la franca por libro de rakontoj, kiuj gajnis la premion "Infanlibro de la jaro" en Vilno en 2005, por ke la stilo sonu eble plej nature kaj infanece: "Rakontoj sub la lito" de Klobučar.
★ Mi ankaŭ apartenas al la teamo de provlegantoj de la revuo Monato.

## 🎻🤡Arto kaj spektaklo

➢ Krei kaj publike prezenti artaĵojn kaj spektaklojn en Esperanto.

★ Unue, mi lernis gitaron por akompani kantadon de miaj klasoj, kaj grupon de infanoj en pluraj REF kaj kelkaj IIK.  Infankantojn de miaj 3 infanoj, gestokantojn en Esperanto mi kompreneble disvastigis dum pluraj jaroj.

★ Poste, mi eklernis violonon en la aĝo de 35 j., sen instruisto kaj per orelo. Ekde tiam, mi uzis violonon en multaj diversaj aranĝoj, kiel ekspozicio por la paco, en Montauban, kie mi informis pri Esperanto, antaŭ lanĉo de mia kurso. Ĉar multajn el miaj mondmuzikoj mi perorele ricevis kaj lernis de esperantistoj.
★ En la 100-a UK en Lille, kun la bando La Kompanoj, post turneo en Francujo por instrui nian repertuaron, ni akompanis impresan kunkantadon dum la Internacia Vespero.
★ En BET 55, en Litovujo, mi estis 55-jaraĝa, kaj mi sola koncertis per muzika kvizo pri popolmuzikoj de 55 landoj de la mondo.
★ En Greziljono, mi organizis staĝon de popoldancado, kunigis kelkajn samstilajn folkmuzikistojn el aliaj landoj,  kaj ni instruis kolektivajn popoldancojn.
★ Spektaklon de klaŭno violonisto kun manpupo de violonisto klaŭno, mi kelkfoje prezentis unu aŭ dulingve, mi eĉ kunprezentis ĝin kun Oktavo, lernema infano violonisto kaj denaskulo.
★ Ankoraŭ en Greziljono, mi kreis dulingvan am-fabelon ornamitan de multaj melodioj de la mondo.
★ Tradukadon de kelkaj kantoj mi kontrolis, por la violonisto Kriztoff, interalie la himnon de la trudizoliĝo, “Rezistos mi”.
★ Dum la Kovim-epidemio, distance, perrete, mi prezentis per mia kvin-korda violono mondmuzikojn aŭ mian landmuzikan kvizon, por pluraj kluboj en ĉiuj kontinentoj, aŭ por eventoj (Malfermo de UK MondaFest’ 2020, VK, VEKI).
★ Por instrui kunkantadon, mi registris kelkajn karaokeajn kantojn per violono, kun subtekstoj, kiuj restas en Jutubo kaj Tubaro.
★ Laŭokaze mi instruis Esperantajn kantojn al eksteraj publikoj: en multaj bazlernejoj kaj popolddanco-staĝoj, okaze de plurlingva kanto-konkurso, en popolaj festoj, en tradiciaj baloj, en festivaloj, mi violonis Esperantajn kantojn en radio-studioj, antaŭ televidaj kameraoj, en stacidomoj, antaŭ operejo, surstrate, dumnokte, en kafejoj, sur multaj scenejoj, kaj eksterlande kompreneble…
★ https://violonodelamondo.wordpress.com/

## 🚘🚗🚍🚄 Turismo, turneoj

➢ Vojaĝi per Esperanto, turnei per Esperanto.
➢ Revene prelegi antaŭ ekstera publiko.

★ Kiel gasto, mi instruis al plenkreskuloj en kelkaj landoj, ĉu kelkajn tagojn (Bangkoko, Tajlando), semajnon (por la granda 55-a BET en Litovujo), ĉu kelkajn monatojn (Ĉeboksaro, Rusujo) ;
★ Mi ankaŭ volontulis kiel gvidantino por la infanoj de la IIK, dum la UK-oj en Montpelliero (Francujo) kaj en Zagrebo ((Kroatujo). Tiam mi instruis kantojn akompanate de gitaro ;
★ Kiel gasto, danke al REU kaj 8 lokaj kluboj, mi realigis mirindan rondvojaĝon tra Rusujo ;
★ Revene, okazis belaj publikaj prelegoj pri mia muzika turneo en Rusujo, en miaj loka kulturdomo, en restoracio kun Esperanta nomo, en la ejo de asocio pri lingvoinstruado, kaj en mezlernejo de instruistino, kiu tie oficiale instruas Esperanton ;
★ Vojaĝantoj esperantistoj helpis mian familion pli bone kaj aktive paroli Esperanton. Mi gastis kaj gastigis ne nur per la Pasporta Servo sed ankaŭ per Amikeca Reto (pacismo) kaj Amikumu. Por mi, kiu instruas laŭ natura metodo, ili estas nepre devaj ;
★ Kaj mi neniam ĉesis gastigi, eĉ pli kaj pli, pere de pluraj organizitaj retoj pri tranoktado por biciklantoj. Mi ne plu povas vojaĝi sed mi tre ofte akceptas vojaĝantojn kaj rakontas al ili pri mia mirinda Esperanta vivo: Couchsurfing, Hospitality club, Bewelcome, Servas, Route des SELs, Mensa SIGHT, CAC de CCI (Cyclo-Camping International), WarmShowers, Dodocyclo, Héberge un cyclo-voyageur, Sleepy Bikes, Trustroots, WTMG… Mia feliĉo estas, kiam post iom da tempo, mi surprize ricevas retmesaĝon aŭ tujmesaĝon en Esperanto!

## 🎪 Kulturaj eventoj

➢ Plani, organizi, reklami publikan eventon, kiu flanke montras Esperanton (ekz. Lingvan Festivalon).
➢ Organizi seminariojn kaj festivalojn dediĉitajn al Esperanto por kunigi la komunumon kaj allogi novajn lernantojn, inviti eksterlandajn gastojn.

★ **Inviton de 3 eminentaj ĉinoj** (el inter ili 2 ministroj) okaze de ilia vizito de mia urbeto en alta montaro, ĉe la itala landlimo, kaj oficiala akcepto en la urbodomo kaj interŝanĝo de donacoj ;
★ Mia **muzika turneo kun violono, en Rusujo** en 2018, tra 8 grandaj urboj laŭ invito de REU ;
★ Invitadi, per Amikumu, lokajn esperantistojn, al fulmo-renkontiĝoj por glaciaĵumi ĉe mediteranea plaĝo. Tiuj pli junaj homoj apenaŭ konas la komunumon kaj la lokajn klubojn ;
★ En grandaj eŭropaj festivaloj pri "folkdancoj" (popoldancado sen publiko, sen kostumo), gvidado de ĉiutagaj rendevuoj por hazardaj esperantoparolantoj ĉeestantaj la festivalon, ekz. en Le Grand Bal (Gennetines) kaj Le Son Continu (centro de Francujo). Tio estigis postajn belegajn kunlaborojn. ;
★ Organizi dutagan **ekspozicion pri Esperanto** en kampara vilaĝo, kun invito de la urbestro kaj partopreno de ĵurnalistino al fulmkursoj kaj ludoj ;
★ Organizi **lingvo-festivalon** kun pluraj dekoj da denaskaj instruantoj de 55 lingvoj, por allogi lingvo-ŝatantojn kaj montri Esperanton al la publiko. Amasa reklamado sed malmulte da publiko. Mia filino sukcese instruis facilajn frazojn de Esperanto (ŝia denaska lingvo) al ĉiuj klasoj de la vilaĝa lernejo. Ankoraŭ nun senteblas la influo al lokaj homoj, kiuj ne parolas Esperanton, sed decidis alpreni Esperantan nomon por sia organizaĵo, koruso, asocio, festivalo, firmao, k.a.
★ Prezenti interagan prelegon, fakte intervjuon de multaj esperantistoj en la mondo, al ordinara kaj turisma publiko. Temis pri nur unu posttagmezo, kie mia programero nomiĝis **"Parler climat en espéranto"**: Tio estis sinsekvo de intervjuoj de po 3 esperantistoj el tri landoj en la mondo, en kultura halo, per granda ekrano kaj laŭtparoliloj. La publiko sidis en la festosalono. Ni utiligis kelkajn retkomunikilojn por video-kontakti homojn, la publiko povis interagi kun la 2 aŭ 3 esperantistoj sur la ekrano danke al mia samtempa interpretado.

## 🗞️🎤📺📷 Amaskomunikiloj

➢ Diskonigi Esperanton en paperaj kaj retaj amaskomunikiloj, publikigi artikolojn kaj filmetojn en Esperanto.
➢ Partopreni en intervjuoj, raportoj kaj filmo pri Esperanto.

★ Partopreno kun mia plej juna filino, en Tulono (Toulon) en la filmo Filmo *Glossolalies* de Érik Bullot en 2003, kaj kantado en France Culture ;
★ Artikoloj en lokaj ĵurnaloj en Briançon, por diskonigi miajn kursojn en la kulturdomon kaj la inviton de 4 ĉinaj gravaj gastoj, antaŭ 1995 ;
★ Intervjuo en la televida kanalo Radio Canada en 2013 ;
★ Artikolo en la nacia revuo de la popoleduka organizaĵo *Les Francas* ;
★ Intervjuoj en radio kaj en televido en 2019 en Ĉuvaŝujo (Rusujo) ;
★ Intervjuoj por gazetoj aŭ radioj en Hispanujo, Bosnujo kaj Hercegovino, Serbujo, Makedonujo ;
★ Intervjuoj por la ĉefaj lokaj gazetoj kaj radio dum 4 jaroj, danke al la loka gazetraportistino, kiu komencis lerni Esperanton sola kaj kun mi ;
★ Ĉefe komence de 2021, por reklami mian Lingvo-Festivalon. Inkluzive de televida rekta elsendo en Brest pri ĝi.

## ⚒️🛜Teĥnologio

- ➢ Subteni la evoluon de teknologiaj iloj por instruado de Esperanto, kiel apoj, programetoj, interretaj platformoj kaj bitmaterialoj.
- ➢ Uzadi kaj disvastigi ilin.
- ★ Origine estis mia asocio Désir d'Apprendre, en Tulono (Toulon) ĉe la Lazura Marbordo, kaj ekloĝante en Okcitanujo, mi renkontis DLM, kreanto de retejo kun abunda kolekto de belaj allogaj instruaj kartludoj kaj tabloludoj, por infanoj lernantaj Esperanton. Kune ni pliampleksigis la kolekton de printeblaj lernoludoj. Sed mi neniam finkorektis lian abundan produktadon de instrumaterialo! https://reseauesperanto82.jimdofree.com/01-apprendre-l-esp%C3%A9ranto/ kunhavigas centojn da elŝuteblaj pdf-lecionoj kaj ludoj.
- ★ Multon mi subtenis, uzadis, disvastigis, jen kelkaj nomoj: Edukado.net, Ĝangalo (...), Esperanto En La Telefono, Vikipedio, Tatoeba, Global Voices, Amikumo, MiaVivo, LanguageTool, Tajpi, la parolrekonilo "Kõnele" por dikti al sia telefono.
- ★ Nuntempe mi serĉas programon, kiu rekonu Esperantajn kaj francajn vortojn, en la sama alineo aŭ frazo, por blinda konga studento mia, kiu lernas per VatsApo.

## 🌍Sociaj retoj

- ➢ Uzi platformojn de sociaj amaskomunikiloj por kunhavigi informojn pri Esperanto.
- ➢ Konstrui interretajn komunumojn kaj promocii lingvorilatajn iniciatojn.
- ★ Kiel membro de Espéranto-Provence, mi iniciatis la ekuzadon de **Fejsbuko** (Facebook) ;
- ★ Lanĉado de la ĉiusemajna "Internacia Babilado" per **Zoom**, diskonigata de **Eventa Servo**, kiu funkcias ĝis nun ;
- ★ Dum la periodo de deva socia izoliĝo, mia nomo kaj tiu de mia vilaĝa klubo publikigis pli grandan nombron da retkunvenoj ol UEA!
- ★ Ambasadoro de **Duolingo** kun pluraj kursoj semajne ;
- ★ Kreado de ĉiusemajnaj internaciaj retkunvenoj por perreta tabloludado de Kodaj Nomoj (esperantigita **Codenames**) ;
- ★ Lanĉado de la **Telegrama grupo** "Fonetika grupo" pri langrompiloj kaj ĉiaj diskutoj pri elparolado (pli ol 300 membroj).
- ★ Lanĉado de modesta movado por tutkore subteni denaskulojn: La Verdaj Mentoroj (baptopatroj) Ekz. mia nepo Tomĉjo, en Kanado kun sia esperantista baptopatro, plenkreska avo-aĝa brazilano, Edson, kiu ame kuraĝigas liajn progresojn.

## 🌐 🤝Internacia kunlaborado

- ➢ Kunlabori kun internaciaj organizaĵoj por promocii Esperanton kiel internacian helplingvon.
- ➢ Diskonigi Esperanton en kelkaj naciaj aŭ tutmondaj NROj, kies membro mi fariĝas.

Ĉiam fruktodonas agadi en asocioj pri kuntuŝaj kampoj: gastigado (*Servas*, *Bewelcome*), popoledukado (*Les Francas*), mondbiciklantoj (*CCI*, *WarmShowers*…), kaj *Mensa*, kie Esperanto plej utile montras siajn valorojn pri justeco, frateco, gastigado kaj vojaĝado kaj ĝenerale pri la faciligo de la kontaktoj. De kelkaj jaroj mi aliĝis al https://www.mensa.org/ kaj kompreneble mi montras Esperanton en tiu organizaĵo. Mi havas neniun esperon anstataŭigi la anglan per Esperanto en *Mensa*. Sed kaj en Esperantujo kaj en Mensa, homoj kun apartaj cerboj pli oftas. Kaj la intereso de la membroj de Mensa pri logiko kaj pri lingvoj favorigas kelkajn por nia afero.

★ Mi verkis artikolon por la nacia franca revuo “Mensa Mag” (kun lernantino de Esperanto, sed sperta membro de *Mensa*) ;
★ Mi prelegis pri Esperanto (registraĵo havebla en Discord kaj Jutubo, kanalo de *Mensa Provence*) ;
★ Tio venigis plurajn interesatojn kaj mi kreis Fejsbukan privatan grupon por membroj de *Mensa-France* lernantaj Esperanton (GIS Esperanto) kaj por Esperantistoj membroj aŭ simpatiantoj de *Mensa* (Espermenso) ;
★ Aktuale mi instruas Esperanton ĉiun tagon en la grupo “GIS Esperanto”, ili ĉiuj estas iniciatemaj homoj kun rapidega menso, kiuj lernas memstare samtempe per aliaj rimedoj. Ĉe ili pli oftas Lernu.net ol Duolingo.

Supozeble mi forgesis mencii kelkajn originalajn agojn, kaj mi enmetis bagatelajn banalaĵojn en la liston…

## Projektoj, revoj

Mi havas tri revojn:

★ ke la Fakultato pri Lingvoj, Esperanto kaj Interlingvistiko, en UEC, kresku (sen mi, nur kun kongaj profesoroj);
★ ke ESPERMENSO renaskiĝu kun pluraj membroj de *Mensa* en UEA (ne nur mi, kie ili do estas?)
★ ke disvastiĝu movado por helpi la gepatrojn de junaj denaskuloj (kiel mia *Verdaj Mentoroj*, aŭ malkiel…)

Fakte ne, mi havas nur unu revon:

# Paco venu! For la militoj!

Fonto: Françoise NOIREAU (Fransoazo Oazo) por la Panteono, en decembro 2023.